

N. N. 88,

Sur monteto tie staras

tradukita de Antoni Grabowski

La kozako

Sur monteto tie staras
Verda la acero;
Mortas juna la kozako
Sur la fremda tero:

“Mortas mi, en fremda lando
Venas mia fino,
Do alvoku la patrinon,
Mia amatino!”

Kaj alvenis la patrino,
Venis patrineto,
Turnis palan la vizaĝon
Kontraŭ la fileto:

“Ho fileto, mia kara,
Devis vi perei,
Ĉar ne volis vi konsilojn
De l’ patrin’ obei.”

“Mi vin petas, patrineto,
Bele enterigu:
Oni batu sonorilojn,
Kaj orgen-ludigu;

Sed ne gvidu min al tombo
Pastroj, nek diakoj,
Nur en teron ukrainaj
Metu min kozakoj.”

*Traduko de la Pola poemo “Tam na górze jawor stoi,” de N. N. 88 en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-1011-2048 (2014-05-18 13:13:18)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur paĝo 46. La teksto troviĝas ankaŭ en http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/la_kozako.html.